

Bulvardo Mentoĉokolado

de Viktor Medrano

§ Ĉokoladaj Memuaroj

Kaj tiel estis en la komenco...

Mi naskiĝis la 10an horon 45 minutoj matene, la 12an de Januaro en la jaro 1966 en la Hospitalo de Sankta Johano de Dio en la Urbo Pasay, distrikto de la Metropolo Manilo sur la insulo de Luzono en la Respubliko de Filipinoj. Mi pensas, ke mi ne naskiĝis je bona tempo. Mi pensas, ke mi estus devinta naskiĝi post pli ol 700 jaroj.

Mia dorlotnomo fariĝis 'Nonong', supozeble el mia meznomo 'Emmanuel'. Multaj Filipinoj havis dorlotnomojn, kiuj ne sonis kiel iliaj oficialaj nomoj.

Mia familio unue loĝis en loko nomita Ferry en la provinco Batangas. Ĝi estis proksime al haveno kaj proksime al ĝangalo. Nia domo troviĝis en multdoma familibieno posedita de miaj patroliniaj geavoj. La familio de Onklino Virĝinia, inkluzive de kelkaj de miaj gekuzoj, estis apuda, krom mia Onklino Viveka. Mi memoras kelkajn aferojn pri mia knabeco tie. Estis kaŝita kaverna inter la arboj sur alta grundo. En la kaverna estis skeleto de soldato, eble de la Dua Mondmilito. Ni kutime kolektis berojn, kiujn ni nomis 'grátilis' tie. Mi ludis per la muzikdiskoj de Onklino Viveka kaj turnis ilin per najlo. Ŝi estis dancisto por la trupo *Bayanihan* kaj estis bone vojaĝinta tiam. Ŝi havis multajn strangajn memoraĵojn de siaj vojaĝoj tra la mondo. Plu, ekzistis tiuj helikeskaj bestetoj el la fosaĵoj. Se oni metus unu en bovlo da vinagro, ĝi sorbus la likvidon.

Ĉirkaŭ la komenco de la jaroj 1970, mia familio translokiĝis al duetaĝa apartamento apud Avenuo Del Monte en la Urbo Quezon en la Metropolo Manilo. Mi memoras kelkajn aferojn tie. Mia pli aĝa frato Fernando, dorlotnomita 'Gary' kaj rare 'Gibong', kaj mi rigardis multon da televido. Ni malordigis nian dormoĉambron farante endomajn tendojn el litkovriloj kaj seĝoj. Unu raran tagon ni vidis sunan eklipson. Ni havis dorlotbeston, kelonion, kiun mia patrino ordonis servistinojn ĵeti al rivero pro superstiĉo. Ni ne parolis la Anglan hejme; ni ĉiuj parolis la Tagalogan. Ni havis geservistojn por helpi ordigi la apartamenton kaj kuiri niajn manĝaĵojn.

Post malmultaj jaroj, ni translokiĝis al Hispanstila domo ĉe 23 Strato Doña María, Altaĵoj Don José, Urbo Quezon, Metropolo Manilo. Estis bona loko por knabeco. Estis malmultaj najbaroj, dispersitaj pretere for. Mi povis vidi por kilometroj ĉirkaŭ mi vakaĵon; la kampo de altaj sovaĝaj flavaj-verdaj herboj aŭ *talahib* sur ruĝa Marseska grundo streĉiĝis

pretere for. Mi kutime ĉasis ruĝajn turnoventetojn, kiuj fojfoje estis tiel altaj kiel domo. Mi provis stari en la centro de la turnoventeto, kaj ĝi rapide forkuras. La vivaĵoj ĉirkaŭe estis interesaj. Vaganta lacerto transiris la straton. Purpurfoliaj tubervitoj kreskis kaŝite en anguletoj. Nokte, estis lumaj lampiroj. La brila plenluno ŝajnis larĝa. Apud nia domo estis vakaĵo kie ni kreskigis plantojn kaj faris tendojn. Arakidoj bone kreskis tie, sed la akvomelonoj ne kreskis tre grandaj. Iam ni havis ĉirkaŭbaritan bruan porkon. Kiam tajfunoj alvenis, la akvo torentis tiel forte, ke la ruĝa grundo skulptiĝis. Estis minacaj tondroj kaj fulmoj, kaj fortaj ventegoj. Iam ne estis tajfuno, sed peza pluvo; ni senkulpaj junspiritaj nudaj geknaboj eliris sur la gazono kaj duŝis nin sub la varma tropika torento.

Malantaŭ la domo estis klifo, superrigardante al vaka lando, kaj ekzistis vidaĵo de la montaro kie la militistoj ekzercis sin pri paraŝutado. Apud la klifo estis verando kun ruĝbrika rostilo; tie, ni fojfoje festis kaj miaj kuzinoj faris la Hula-dancon.

La ruĝaj ebenaĵoj ĉirkaŭ la domo estis esence plataj kun malmultaj krutaĵetoj. Ni geknaboj kutime piedvagis kaj ŝajnigis, ke ĉiu areo estis malsama planedo en la sunsistemo: Merkuro, Venuso, Marso, kaj tiel plu. Ni rigardis multon da sciencfikcio el eksterlandaj televidprogramoj, kiel el Britaj, ekzemple *Space: 1999* kaj *UFO*, kaj ankaŭ kiel el Usonaj, ekzemple *The Time Tunnel* kaj certe *Star Trek*. La Angla el la televido estis iomete rapida kaj nebula por miaj oreloj tiam, kvazaŭ mi rigardas Francan televidon tre pli malfrue en mia vivo. Ekzistis ankaŭ subtitolitaĵoj Japanaj programoj kiel *Shintarō* pri samurajoj kaj ninĵoj, kaj ankaŭ Japanaj kartunoj kiel *Gigantor*, sed tiam mi ne estis konscia pri ilia «Japaneco». Ekzistis ja ankaŭ Usonaj kartunoj kiel *Spiderman*. Ekzistis ankaŭ kelkaj programoj per la Tagaloga lingvo, inkluzive de kinoj pri temoj dramaj, teruraj, kaj humuraj. La teruraj temis pri Filipinaj ekvivalentoj de vampiroj, sorĉistinoj, gnomoj, kaj aliaj magiaj estaĵoj. Mi memoras, ke en la dormoĉambro de niaj servistinoj estis Tagalogaj komiksoj pri temoj dramaj kaj kelkaj sciencfantastaj. Unu el ili temis pri vizito al ĝangala Edeneska planedo per spacŝipo. Evidente, unu el niaj servistinoj ŝatis sciencfikcion. Tio estis en la jaroj 1970.

Nia abunda ĝardeno havis variajn tropikajn plantojn kaj rare serpentoj siblis en la vepro. Post pluvado, troviĝis malmultaj buntaj platvermoj sur la gazono. Mi estis frua biologo kiel knabo; mi transpolenis blankan hibiskon, kiu nomiĝas *gumamela* per la Tagaloga lingvo, kun ruĝa, kaj baldaŭ aperis rozkolora *gumamela*. Ni havis cirkon da raŭpoj en la malantaŭa korto kaj nomis ĝin «la Bela Parko». Voluptaj irizaj skaraboj abundis. Ekzistis multaj variaj formikoj grandaj kaj malgrandaj; nigraj, ruĝaj, kaj bluaj. Sola taŭrorano je la grandeco kaj pezeco de kegloluda pilko sidis ĉe angulo de la garaĝo. Ĉe la garaĝo aŭtovoĵeto dum semajnfinoj, ni kaj miaj kuzoj praktikis karateon kaj mia patro praktikis Filipinan stangan kombataron, kiu nomiĝas *arnís de mano*. Iam scivolemaj spektantoj, kelkaj malpli riĉaj knaboj, troviĝis ekstere sur la strato. Kelkfoje stratmarŝanta vendanto de *tahô*, sojfabo kazeo, ekkriis «Tahooooooooô!» kaj poste li haltis submetante

la metalajn cilindrajn kestojn de siaj ŝultroj kaj ŝovelis la ravan blankan kazeon en niajn plastajn glasojn. Ĉiuj ni geknaboj pagis al li po unu Filipina *peso*. Tio estis en la jaroj 1970.

En la domo, mi kuŝiĝis plate sur la malvarmeta marmora planko de nia salono dum varmegaj someraj tagoj. Sur tiu sama marmora planko, mi amuziĝis per krei templeskan labirinton el verdaj kaj blankaj maĝangaj blokoj, kaj poste irigi kurkulion tra tio. Apud la ŝtuparo estis la ĝojiga drinkbufedo de mia patro; ĝi havis la formon de ĉevalkaleŝo. En ĝi estis variaj boteloj da drinkaĵoj por gastoj. Ni havis bibliotekan ĉambron, kie iam ni gardis viglajn araneojn en vitraj kruĉoj kaj pendigis buntajn kartonajn militaeroplanojn, kiel Messerschmidt-ojn kaj Zerojn, de la plafono. Supre de la ŝtuparo estis la dormoĉambroj. Dum iama aŭroro en la dormoĉambro por infanoj, kie mi dormis, estis bona vidaĵo de la Kometo Kohoutek, kiu orbitis la Sunon po ĉirkau 75 000 jaroj. En la dormoĉambro de mia onklino-gubernistino, *Tita Nedy*, estis amuziga kolekto de vitraj kruĉoj da fungoj en akvo kaj aro da kuriozaj tarokkartoj. En la dormoĉambro de miaj gepatroj estis la televidilo, el kiu ni geknaboj spektis niajn kartunojn kaj sciencfikcion de la Anglosfero, argilajn animaciojn de Eŭropo, kaj samurajajn dramojn de Japanujo, kaj ankaŭ lokajn programojn en la Tagaloga. La televido estis kolora, dum la alia en la salono sub la ŝtuparo estis nigra-blanka, el kiu niaj servistinoj ofte spektis siajn dramojn. Ankaŭ subŝtupare estis la gastĉambro, kie mia Onklo Alberto, '*Tito Boy*' al mi, ofte restis kaj studis siajn grafikajn medicinajn librojn por sia universitato. Tio estis en la jaroj 1970.

Mi memoras, ke nia marmora salona planko estis blanka, la sovaĝaj herboj ekstere estis verdaj-flavaj, la grundo ekstere estis ruĝa, la sojfabo kazeo estis blanka, kaj mia favorita ignampasta deserto *ube* estis purpura, sed la nacio Filipinoj volas esti konata kiel 'bruna lando'. Tion lernas studentoj en lernejoj tie. Per la Tagaloga, bruno tradukiĝas al *kayumanggi*. Pro tio, ĉi tiuj memuaroj estas ĉokoladaj.

§ Ŭabio-Sabio

侘び寂び

Wabi-Sabi

La vortoj de Tazuo Nakamura sekvas...

«La simpleco en la homo venas de la simpleco en la naturo. En la ĉanojo [teismo] ĝi estas nomata *ŭabio* (侘び [wabi]). Ŭabio estas la vivo de severa povro - evito de ĉio, kio estas riĉa, pompa kaj hadea...; ĝi venas de la homa naturo, kiu ne toleras daŭre ion tro luksan, dremecan aŭ hiperbolan. En ĝi oni trovas aŭ kreas la belecon, nomatan *sabio* (寂び [sabi]). Sabio estas la beleco kovrita aŭ kaŝita, ne brila sed modesta, ne patosa sed patina; ĝi estas lasita en sekreto...» (paĝo 36)

«Ŭabio estas pli spirita ol materia. Se en ĝi iu sentas mankon aŭ grumblas pri io, li ne estas ŭabiulo, sed malriĉulo, laŭvorte - mizera. Ŭabio estas la stato de absoluta spirita povro, en kiu, havante nenion, posedas ĉion. En ĝi oni vivas 'malriĉaj en spirito', sed havas 'vivon abunde' - laŭ la estetika aŭ poezia senco de la esprimoj. La ĉanojo de ŭabio aŭ sabio - same kiel hajko - estas modesta provo trovi kaj ĝui ion belan kaj indan en la plej ordinaraĵoj de la ĉiutaga vivo.» (paĝo 37)

«La vortoj 'ŭabio' kaj 'sabio' estis unue uzataj en la poezia (utaa) literaturo, poste en la hajko kaj en la ĉanojo. Pro manko de taŭgaj vortoj en la eŭropaj lingvoj *sabio* estas tradukata per 'rafinita simpleco' kaj similaj. Tia ĝi estas, sed kun la nuancoj supre aluditaj. Estas notinde, ke se la gusto de sabio esprimiĝas en koloro aŭ en desegno (de vestaĵo, ekzemple), oni nomas ĝin *ŝibua* ... *Ŭabio* ofte estas tradukata per 'soleco' kaj similaj, sed tia ĝi ne estas, ĉar 'soleco' estas unu stato de la egoo, en kiu la homo ne povas ami, nek povas esti amata; ne povas servi, nek povas esti servata de aliaj. Oni scias, ke la ŭabiaj teistoj aŭ hajkistoj - same kiel tiuj, kiuj ne havis, 'kie kuŝigi sian kapon' - ĝenerale havis multajn disciplojn, adeptojn kaj amikojn, kiujn ili amis kaj reciproke...» (paĝo 38)

...el *Enciklopedieto Japana* (1964) de Tazuo Nakamura

§ Meksiko de Viktoro

Tiu ĉi rakonto estas pri mia vojaĝo al Kankuno en Meksiko dum du semajnoj en Septembro de la jaro 1992. Mi vojaĝas kune kun mia amiko kaj kunlaboristo Franko Gee, kiu estas Ĉina Okcidentulo. Estas mia unua vojaĝo al Meksiko.

Ni prenas la flugmaŝinon el Vankuvero en Kanado kaj haltas en Kalgario en la provinco Alberto. Poste, ni flugas al la flughaveno en Kankuno, Meksiko.

Ĉe la Kankuna flughaveno, la buso de la Klubo Med atendas nin. Ni prenas la buson al la Klubo Med, granda ludejo kaj vizitejo. Mi sentas la aeron pli humida kaj varma.

La ĉambro estas *Opera 15* apud la blanksabla marbordo, kie estas iomete roka tie. La palmoj estas ĉieaj. La ĝardenistoj estas malaltaj ge-Meksikanoj, kiuj aspektas indiĝenaj, eble de Majaa sango. Kelkaj Meksikanoj diras, ke ni du estas Meksikanoj, sed eble ili scias, ke ni estas Azianoj. Plejparte da vizitantoj estas junaj blankhaŭtaj Eŭropanoj kaj Usonanoj. Kelke da vizitantoj estas mezaĝuloj. Malmulte da vizitantoj estas Azianoj ĉar eble aliaj el ili estas en aliaj hoteloj. La Klubo Med estas Eŭropa firmao kun internacia stabo.

La Klubo Med troviĝas en la Hotelzono, kie multaj hoteloj enlinie staras laŭ la ĉefa vojo. La apuda hotelo estas rozkolora. Estas kelkaj pajlsegmentaj kabanoj sur la marbordo, kiujn la Meksikanoj nomas «palapas».

La manĝoj matenaj, tagaj, kaj vesperaj estas grandaj bufedoj, en kiuj unufoje mi provas ranajn krurojn. La manĝaĵoj estas tre variaj kaj ravaj. Mi plenigas mian stomakon maksimume. Dum unu manĝo, ni sidas kun mezaĝa blankhaŭta policano el Novjorkurbo. Li sonas melankolia pro laboro eble. Estas bone, ke li elektas iri al Meksiko.

Ĉiutage estas sportoj por ni. Ni provas veli, sed la boato kelkfoje falas. Ni provas marplonĝi kun skuboparato. Estas timige. Ni altrapide akvoskias apud marĉejoj kun krokodiloj. Mi perdas unu lenson el mia paro da kontaktlensoj. Ni provas ankaŭ ventsurfadon. Mi kaj la surftabulo iras tro for de la marbordo, ke la sunbrunigita Izraela instruisto devas tiregi min revenante al la sekura zono per motorboato. El la sportoj, mia preferata estas snorkeli kaj do mi povas vidi la biologion en la akvo, la buntajn fiŝojn, koralojn, kaj plantojn. La sablo ĉe la sportzono estas pulvora kaj blanka, ne roka. La Karibea akvo estas lazura kaj varma por bani.

Ni vidas kaj salutas blankhaŭtan mezaĝan Kanadaninon, tute solan, kiu faras nenion ĉiutage, sed legi libron sur la sablo. Estas bone por ŝi.

Dum ni marŝas laŭ la marbordo hotelon al hotelo, ni vidas neston da keloniaj ovoĵoj elkoviĝi en la sablo. La keloniidoj iras al la akvo.

Estas multaj grandaj igvanoj sur rokaj lokoj. Mi fotas ilin.

Ni partoprenas ekskursojn ekster la Klubo Med. La 14an de Septembro, ni ekskursas al Tulumo, Majaa templosituo. Ĝi staras sur alta klifo apud la marbordo, ŝajnante ekstermonda. Ni vizitas aliajn ruinojn laŭ la marbordo.

Poste, ni iras al Xel-Ha (Ŝel-Ha), koralala naĝejo, kie ni snorkelas. Estas buntaj fiŝoj. La akvo varmas.

La 15an de Septembro, ni vizitas la urbon de Kankuno, la «Poto da Serpentoj» en la Majaa lingvo. Ni iras al moderna butikaro. Ni vizitas la bazarojn ekstere. Mi aĉetas tradician kovrilon multekoste por donaco al mia patrino kaj mi aĉetas skulptojn kaj aliajn objektojn por mi. La komizoj estas agresemaj. Unu el ili, mestizo, minacas min, dirante, «Mi mortigu vin se vi aĉetos el alia!». Mi ne scias ĉu li estas serioza aŭ humura.

Antaŭ unu ekskurso, kiam oni eniras buson, Eŭropa multlingva gvidantino aŭdas onian nomon. Mi diras je «Med-ra-no» kaj ŝi ripetas mian nomon per la ĝusta Hispana prononco de «Me-dra-no». Estas iom strange.

Dum la Tago de la Ekvinokso, ni prenas etan flugmaŝinon al Ĉiĉen-Itza, la fama loko de antikva Majaa piramido en la centro de la tropika ĝangalo. Estas la Piramido de la Kukulcano. Ekzistas ankaŭ antikva observatorio. Aliloke, ekzistas konstruaĵo, kiu nomiĝas «La Monahinejo» ĉar, laŭ pratempaj Hispanoj, ĝiaj multaj ĉambretoj similas al monahinejo.

Oni supozas, ke tiun tagon ombro de serpento irus suben laŭ la ŝtuparo de la Piramido de

la Kukulkano. Sed tiun tagon estas nube kaj la ĉielo estas griza. La Kukulkano estas la Birdserpenta Dio.

Ĉirkaŭ la situo, mi aŭdas surbendigitajn eksplikojn laŭte per la Hispana kaj la Majaa. Nia turisma gvidanto estas Majao kaj persone eksplikas per la Angla pri la ĉirkaŭaĵojn. En muzeo, mi aĉetas feltan afiŝon kun Majaaj glifoj pri mia naskiĝdato je la Majaa kalendaro. La glifojn komputilo skribas.

Ĉe la Klubo Med, la noktoj estas festoj. Oni dancu kaj ludu. Estas organizitaj ludoj, kiujn hotelaj ludestroj kuraĝigas al vizitantoj partopreni. Mi ne ŝatas unuafoje, sed pli malfrue partoprenas.

Dumnokte, mi preferas marŝi laŭ la marbordo sub la nigra ĉielo, aŭdante la molajn ondetojn de la maro, kiam estas preskaŭ neniu ekstere. Estas stranga alimonda sento.

Mi renkontas virinojn. Unu el ili estas multlingva blonda Svisgermanino, kiu ŝatas dumnokte danci sur la sabloj, kaj la alia estas svelta Japanino, kiu ŝatas rideti. Franko estas tro timema pri tiaj aferoj.

Kiel memoraĵojn, mi aĉetas librojn el la kluba vendejo. Estas *Majaa Gramatiko* de Alfred M. Tozzer kaj *Skiza Vortaro de Majaaj Glifoj* de William Gates. Apud la sabloj, Usonano vidas min legantan la librojn kaj diras, ke «kia profunda» mi estas.

§ In Search of the Pharaohs

[1991.12.21 - 1992.01.04]

[1991.12.21] I joined a group tour to Egypt. It was a small friendly group. We flew from Canada and arrived in Cairo the following day.

[1991.12.22] In Cairo from the airport, our bus snaked through the city at night. The most interesting thing I remembered was the blazing neon-lit signs in squiggly Arabic. We made it to our hotel for dinner.

[1991.12.23] We had a full day's sightseeing at the Great Pyramids, Sphinx, Memphis, and Saqqara. The sky was not its usual crispy blue, but tinted grey. Nevertheless, seeing these sites was a quasi-religious experience. There were vendors at the Pyramids selling stone scarab beetle ornaments.

[1991.12.24] In the morning, we had a tour of the Egyptian Museum, which included the glorious treasure of King Tut. Then we toured the mosques. After a free afternoon, we boarded an air-conditioned sleeper train for our overnight journey to Luxor in the south. I joined the Theessen family, who were a couple with their two tall teenage daughters,

for a little Christmas celebration in one of the smoke-smelling compartments.

[1991.12.25] It was my fondest memories of Christmas in Luxor. We stayed at a hotel by the Nile. I could sit poolside with a view of the lily-filled river whilst classical music would be blaring from the pooldeck sound system. I could remember that most of the tourists there were French. It was a grand buffet for dinner. I could remember a tall "Christmas Tree" made of cream-puffs.

[1991.12.26] We rode by caleesh, a horse-drawn carriage, under crispy blue sky to the incredible temple of Karnak, an enormous religious site. I walked around the town of Luxor. The atmosphere was very rustic and Arabic. One had to haggle in the markets for souvenir items. People were so friendly when they wanted to sell someone something... I became friendly with the foursome Lee family, who were a couple with a daughter (in her twenties) and her aunt. Mrs. Lee lent me her books about Egypt.

[1991.12.27] We had a two-hour donkey ride through the dangerous narrow paths in mountains leading to the Valley of the Kings. A taxi ride would have taken 15 minutes. From up on top, I could see where the desert and the green parts nourished by the Nile met, an incredibly distinct demarcation. At the Valley, we had a guided tour of King Tut's tomb, as well as other pharaohs' tombs.

[1991.12.28] We had a free day at Luxor for more souvenir-hunting. I haggled for statuettes of Egyptian gods and hieroglyphic scribblings on papyrus.

[1991.12.29] We left Luxor and headed for Aswan by bus. Along the way, we visited the Kom Ombo Temple where ancients worshipped the Crocodile God. Again, the sky was crispy blue. Then we made it to the Edfu Temple, home of the Falcon God, Horus.

[1991.12.30] We drove deep into the desert coming to within 50 km of the Sudanese border as we visited the imposing temples of Ramses II and his sister-wife Nefertari. The temples were hewn from the living rock at Abu Simbel. We spent the night at the Aswan Hotel.

[1991.12.31] It was a free day to enjoy the beauty of Aswan with its African atmosphere. At New Year's Eve, I was at the Club Med at Amun Island in the middle of the Nile. There was a little wine-drinking.

[1992.01.01] We rode by graceful Felucca sailboat to Elephantine Island and its museum. We had a 25-minute camel ride across the desert to the ruined Christian Monastery of St. Simeon. Amongst the ruins, I saw a small group of Catholics having mass! Again, the sky was crispy blue.

[1992.01.02] It was a free day to explore Aswan. Eating in the restaurant was quite memorable as I bit into some sand. A bit of sand in the food could not be avoided in these parts. In the evening, we headed for Cairo in a sleeper train.

[1992.01.03] We made it to our hotel in Cairo. It was rather a very rugged hotel. We walked around a bit. The Cairo skyline was quite distinctive, a mixture of modern buildings and old mosques with their graceful turrets. A wispy haze overlaid the ancient metropolis.

[1992.01.04] On our flight from Cairo to Canada, we had a stopover at New York City. We had a quick city tour. It was a rainy, grey day, but it was a blast to see Manhattan.

§ Indonezio de Viktoro

Tiu ĉi rakonto estas pri mia vojaĝo al Bali-insulo en Indonezio dum tri semajnoj en Februaro kaj Marto de la jaro 1999. Mi vojaĝas tute sole. Estas mia unua vojaĝo al Indonezio.

Mi prenas flugmaŝinon el Vankuvero en Kanado al Singapuro. Singapuron, kiu estas ĝardeno kosmopolita urbo kun bonaj manĝaĵoj, mi admiras dum tri tagoj. La trinkaĵo rozlakto, kiu ĉi tie nomiĝas «bandung», tre plaĉas al mi. La Malajziaj desertoj, kiel glaciaj ŝiraĵoj kun faboj aŭ kun durianfrukto aŭ kun ruĝaj-verdaj rizpastaj gutetoj, tre plaĉas al mi. Ankaŭ la rava Malajzia spicita supo plaĉas al mi. Ankaŭ la kareaj loligoj en varmega metala poto kun blanka rizo estas ravaj. La hotelĉambra televido amuzas min. Mi ŝatas multlingvan Singapuron. Poste, mi flugas al Bali-insulo en Indonezio.

El la Balia flughaveno, mi taksias al mia hotelo, *Holiday Inn Resort Bali Hai* (ĉe la adreso per la Indonezia: «Jalan Wana Segara 33, Tuban 80361, Bali, Indonesia»), apud Tuban-plaĝo en la vilaĝo de Kuta, kiu troviĝas en la suda parto de la insulo. La plaĝo tie ĉi estas bona, sed ne estas tiel bona kiel en la vilaĝo de Nusa Dua, kiu troviĝas pli sude ol Kuta.

La indiĝena lingvo sur Balio estas la Balia, kiu estas Aŭstronezia lingvo kiel la Indonezia, la nacia lingvo. Ankaŭ mia gepatra lingvo, la Tagaloga aŭ la Filipina, estas Aŭstronezia lingvo. Ankaŭ la Havaja kaj la Samoa estas Aŭstroneziaj lingvoj. La Indonezia tre similas al la Malajzia, ankaŭ kiu estas Aŭstronezia lingvo. Ĉiuj Balianoj lernas la Indonezian en lernejo. Aliaj Indonezianoj el aliaj insuloj venas al Balio por vivi, tiel ke la Indonezia lingvo gravas por interkomuniki. Aldonendas, ke ĉar ĉi tiu insulo estas turisma loko, la loka eduksisistemo apogas la lernadon de la Angla. Mi aŭdas ĉi tie Balianoj, kiuj parolas ankaŭ la Japanan. Multaj Aŭstralianoj kaj Japanoj vizitas Balion.

Ĉe mia hotelo, ĉiutage mi manĝas preskaŭ tute sole en la hotelrestoracio. Mia preferata estas la ĉumi-ĉumi-o, kiu estas kareaj loligoj en varmega argila poto kun blanka rizo. Unuokaze post manĝo, mi petas la fakturon Anglalingve per «bill» kaj la Indonezia kelnero demandas min ĉu mi volas bieron (Angle «beer» kaj Indonezie «bir»). Unufoje, mi ne scias ĉu mi devas aldoni trinkmonon post la prezo aŭ ĝi inkluzivas. Mi demandas

Franclingve alian turiston, mezaĝan Francon, pri tio kaj li diras al mi, ke estas ne devige. La prezo estas inkluziva. Mi timas embarason.

Mi pasigas la tempon apud la naĝejo kaj la plaĝo. Ĉi tie oni povas mendi freŝan kokoson en la verda ŝelo. Tion mi faras fojfoje, sed malfeliĉe ili havas malmulton da blanka karno. Mi renkontas junan trinkservanton, kiu nomiĝas Made Budi Artawan, kiu parolas la Anglan relative bone. Pli malfrue, li enkondukas min al la vilaĝo de Kuta ekster la hotelo. Li diras al mi, ke aliaj hotelvizitantoj donis al li muzikdiskojn kaj aliajn objektojn. Ni iras al moderna butikaro. Mi iras al la librovendejo kaj serĉas libron pri la Balia lingvo, sed estas nenio. Preskaŭ ĉiuj libroj estas en la Indonezia. (Ekzistas kelkaj Anglalingvaj libroj por turistoj.) Tiam ĉi, mi interesiĝas multe pri la Balia ĉar ĝi havas ekzotikan antikvan alfabeton, sed mi malpli interesiĝas pri la Indonezia ĉar ĝi skribiĝas per la Roma alfabeto. Tamen, kiam mi revenos al Kanado, mi ekbruligos mian intereson pri la Indonezia.

Revenante al la hotelo, Budi kaj mi vidas fruktvendejon kun oldulino, kiu vendas la fruktojn «salak» aŭ serpentfruktojn. Ili tiel nomiĝas ĉar ili havas haŭton kiel skvaman brunan serpenton. Mi aĉetas unu sakon da ili. Dum la mona interŝanĝo, mi iom nervoziĝas kaj pensas, ke io estas miskalkulita. Sed eble mi malpravas. Mi ne al kutimiĝas al la Indonezia mono. Poste, ni iras al trinkejo kaj mi havas avokadan trinkon. Budi avertas min pri la alta kolesterolnivelo de la avokado. Poste, mi revenas al la hotelo. Kaj Budi revenas hejmen. Li diras al mi, ke kiam mi revenos al Balio, mi kunportu mian amikilon.

Ĉe la hotelo, mi malstreĉas min. La hotelĉambra televido montras multlingvajn fremdajn programojn por la gastoj.

Mi fojfoje uzas Interretbutikon en la vilaĝa butikaro. Pli malfrue, la Interretbutiko de mia hotelo establiĝas. Tie ĉi, mi renkontas mezaĝan Indonezian komizon, komputiliston, kiu volas, ke mi kontaktu lin kiam mi revenos al Kanado pri ebla okupado kaj migrado por li. Mi kompatas. Li eble subsugestas, ke la Interreto estas ja laboro...

Iam mi pasigas la tempon apud la naĝejo. Mi sidas sur la rando, trempante miajn kruojn en la akvo. Aro da junaj blankulinoj troviĝas ĉe la alia flanko de la naĝejo. Ili faras iom da bruoj kaj delogas junajn brunajn Indoneziajn kelnerojn ĉirkaŭ la naĝejo. La virinoj rimarkas min kaj mansvingas al mi. Unu el ili diras, «Estas Budaol!». Mi mansvingas al ili per la maldekstra mano kaj unu el ili ordonas, «Per la alia mano!». Do, mi mansvingas al ili per la dekstra mano...

Iuj tagoj ĉirkaŭ la hotelo, kelkaj Indonezianoj ĉasas min pro vendi lignajn varojn, kiel primitivajn statuojn de indiĝenaj homoj. Kelkaj el ili estas junaj, eble dekkelkjaraj. Fojfoje, ili kriegas je «Kanado! Kanado!» al mi ĉar mi antaŭe prezentis min, kiel Kanadanon. Unu el ili havas ruĝan-blondan hararon, sed brunan haŭton. Mi scias, ke tiu kondiĉo estas natura inter kelkaj Malajo-Polinezianoj. Kelkaj gevendistoj estas mezaĝaj virinoj, kiuj estas tre agresemaj pri vendi kaj finfine konvinkas min aĉeti la brunajn

statuojn, kiuj eble estas magiaj. Ĉe la plaĝo dum stranga horo, iu junulo konvinkas min aĉeti oleopentraĵojn, kiujn mi ne tro ŝatas ĉar ili estas de la Okcidenta stilo. Tamen, mi kompatas.

En la hotelvendejo, mi traserĉas la varojn. La Indonezia komizino parolas al mi pri religio, specife pri Budaismo. Ŝi konvinkas min aĉeti tablomatojn por donaco al mia patrino, kiu antaŭpetis ilin de mi. Pli malfrue, en la vilaĝa bazaro, mi trovas pli belajn similaĵojn malpli kostajn. En la bazaro, mi aĉetas primitivajn pistilon kaj pistujeton por donaco al mia najbaro, mia frato, kiu antaŭpetis ilin de mi. Por mia unujaraĝa nevino, mi aĉetas brilkoloran batikan kostumon. Mi aĉetas aliajn objektojn por miaj aliaj familianoj en Kanado kaj magian statuon por mia Ĉina intelekta amiko Donald en Kanado. Mi aĉetas metalan sonorilon kaj aliajn memoraĵojn por mi mem.

Mi partoprenas ekskursojn al aliaj lokoj sur Balio. Mi vizitas la Balian Birdan Parkon, kiu havas multajn birdojn kaj aliajn bestojn, kiel reptiliojn. Mi fotas florojn, kiuj nomiĝas «Birdoj de Paradizo». Ili estas plejparte brilruĝaj kun flavaj partoj.

Antaŭ alia ekskurso, inter aliaj turistoj, mi atendas en turisma aŭtobuso. Subite, familio da Hispanaparolantoj eniras la aŭtobuson kaj eksidiĝas. La Indonezia turisma estro diras al ili, ke la lingvo en tiu ekskurso estas la Angla kaj tiu familio uzu alian ekskurson per la Hispana lingvo.

En iu ekskurso, mi rigardas la sunsubiron apud Tanah Lot, antikva Hindua templo sur insuleto tre proksime de la plaĝo. Tie ĉi, junulo, kiu nomiĝas Wayan kaj vendas poŝtkartojn, ŝatas amikiĝi kun fremduloj, kiel kun mi.

En alia ekskurso, mi piedvagas tra la grandioza Hindua templosituo de Besakih sub pluvo. Besakih troviĝas sur alta grundo. Ĉe la norda parto de la insulo, mi vizitas la plaĝon de Lovina, kie la sabloj estas nigraj pro vulkanismo. Mi iras al la arta vilaĝo Ubud, kie ekzistas bazaro plena da indiĝenaj artoj. La vojoj, kiujn la aŭtobuso trairas kaj zigzagetas, estas montaraj, kio fojfoje naŭzigas min. Mi vidas terasajn rizkampojn ĉie. Mi vidas belajn virinojn portantajn objektojn sur siaj kapoj. Eble la objektoj estas korboj aŭ potoj aŭ aliaj. Mi rigardas tradiciajn dancojn en teatro. Mi vidas multajn bestojn, kiel timigajn vespertojn kaj petolajn simiojn.

Mi decidas, ke kiam mi revenos al Balio, mi loĝos en la vilaĝo Ubud kaj troviĝos inter artistoj.

§ Viktorio

En Marto de la jaro 2002, la familio Ferrer, inkluzive de onklo Ĵo, onklino Mila, kaj kuzo

Ĵoĵo, vizitis la Domon Rideau en Riĉmondo, ĉefe por vidi sian familianinon, mian kuzinon Eva. Ni kvin decidis ekskursi al la urbo Viktorio ĉe Vankuvera Insulo dum la 12a al la 14a de tiu monato.

Ni kvin prenis aŭtomobilon kaj rajdis pramŝipon trans la markolo. La pejzaĵo sur la akvo estis tre bela. Oni vidis verdajn arboplenajn insuletojn for.

Ni kvin loĝis en bela olda pensiono, posedita de afabla Ĉina familio. Estis ĉarma domo kun oldaj mebloj kaj dekoracioj. Ni matenmanĝis ovojn kaj panojn tie kaj diskutis pri Esperanto. Mia onklo estis ekscitata aŭdi pri artefarita lingvo idealisma.

Ni turismis kelkajn lokojn, inkluzive de la parlamento, granda muzeo, kaj bazaroj. Ĉe vendejo de malnovaj libroj, mi aĉetis la libron *Enkonduko al Hajkoj* verkitan de Harold G. Henderson. Tiu temis pri Japana poemarto. Ekstere, la ĉielo estis iomete nubeca. Pluvetis. Ni marŝis tra la stratoj. Sed per aŭtomobilo, ni vizitis ankaŭ la Kastelon Craigdarroch, konstruitan de la Skoto sinjoro Robert Dunsmuir, la plej riĉa viro en Brita Kolumbio dum la 19a jarcento. La kastelo ekkonstruiĝis en la jaro 1887, la sama jaro de la naskiĝo de la lingvo Esperanto.

Poste, ni aŭtomobilis norden al la urbeto Nanaimo. Survoje estis arboplene. Ni do pramŝipis reveni al la ĉeftereno.

§ Parizo de Viktoro

Tiu ĉi rakonto estas pri mia vojaĝo al Parizo en Francujo en la jaro 2004. Mi vojaĝas kune kun mia kuzino Eva Ferrer. Estas mia kvara vojaĝo al Eŭropo, tria al Parizo.

La 1an de Junio, ni flugas de Vankuvero en okcidenta Kanado al Montrealo en orienta Kanado. Tiam, pluvas kaj malvarmas ĉe la flughaveno en Montrealo. El Montrealo, ni flugas al Parizo. Estas laciganta flugo por mi.

La 2an de Junio, ni atingas la Parizan flughavenon kaj ĉi tie la sekureco estas mola. La doganino apenaŭ rigardas mian pasporton. Ŝi ne stampas la pasporton. Ŝi ne rigardas aŭ prenas mian enflugmaŝiniĝan karton. Preni niajn pakaĵojn estas facile.

Ni prenas la antaŭaranĝitan taksion. Eva parolas pri politiko kun la taksiisto. Eble la taksiisto ne tute komprenas ŝian akcenton en la Angla. Mi plejparte silentas. Rigardante siajn ĉirkaŭaĵojn, ŝi komparas Parizon kun Novjorkurbo kaj Ĉikago. Eble estas simple kulturŝoko por ŝi. «Kiel formikoj!», ŝi diras. Ekzistas tro da homoj en la stratoj. Ekzistas tro da aŭtomobiloj. Ne sufiĉas aŭtoparkejoj. Mi ne konsentas kun ŝi, ke ili estas «kiel formikoj» ĉar mi spertas pri pli homplenaj urboj kiel pri Honkongo, Tokio, kaj Manilo. Jes, eble ŝi forgesas pri Manilo, kie ŝi loĝis antaŭlonge.

Ni atingas la Hotelon Placo Clichy ĉe 71 Strato de Douai. La ĉambro estas numero 42 sur

la kvara etaĝo. La ĉambro estas malgranda, kio estas kutima en Eŭropaj hoteloj. La dulita ĉambro kun banejo kostas kutime po 84 eŭroj por tago. Sed eble ni pagas malpli je rabato.

Eva malsprite forgesas sian manpakaĵon kun siaj medikamentoj ĉe la matenmanĝejo. Bonŝance, ni revenas tien kaj trovas ĝin sur seĝo. Estas alia stranga viro en la ejo.

Mi dormetas. Kaj poste, ni eliras la hotelon. Ni marŝas laŭ la Bulvardo de Clichy. Ni rigardas la faman Moulin Rouge. Ni eniras la restoracion Quick, rapidvorejon, kaj manĝetas. Ni iras al Tati sur la Bulvardo Rochechouart. Tati estas magazeno de malmultekostaĵoj. Mi rigardas la ĉirkaŭaĵojn kaj rimarkas, ke la hotelo estas proksime al seksbutikoj kaj sekskinejoj, speciale ĉirkaŭ la Placo Pigalle. Ĉiuj konstruaĵoj estas kuriozaj antikvaĵoj.

Mi antaŭplanas la celojn por morgaŭ. Eble, ni iros al la Tombejo de Montmartre, la Sankta Koro, la Halo St-Pierre, la Art's Factory, kaj la Galerioj Lafayette.

Ĉe la hotelo, mi pasigas la tempon per legi mian Anglan-Indonezian vortaron ĉar mi lernas la Indonezian. Mi intencas legi librojn de Harry Potter en la Indonezia.

La 3an de Junio, ni vekigās frumatene. Ni matenmanĝas ĉe la hotelo. La menuo inkluzivas de pano, marmelado, fromaĝo, kaj teo aŭ kafo, kaj oranĝsuko, kiujn ni remanĝos dum kelkaj sekvantaj matenoj. El la hotelo, ni marŝas al la Tombejo de Montmartre. Ĉi tie, ekzistas multaj antikvaj ŝtonaj muskoplennaj tomboj. Mi fotas plene per mia nova cifereca fotilo. Ni marŝas tra la mistera tombejo. Mi trovas interesan tombon kun la gravuritaj vortoj «Famille G. Medrano, Boum Boum»; evidente temas pri cirkofamilio: La familio Medrano en Eŭropo famiĝis per sia cirko.

Elirante la tombejon, mi rigardas Japanon kun lia multekosta tripieda fotilo kaj mi diras «Bonan matenon!» per la Japana. Li bonmatene salutas min ankaŭ per la Japana.

Ĉe la Strato Caulaincourt, mi rigardas belan Francinon kun longaj panoj. Ŝi akcidente faligas unu panon kaj subite alprenas ĝin inter aliajn panojn en siaj manoj.

Ni piedvagas alte al monteto, kie troviĝas la Kirko St-Pierre-de-Montmartre apud la grandioza Baziliko de la Sankta Koro. Proksime de tiuj estas Placo de Tertre, kie portretartisto ĉasas min por voli desegni mian portreton kun certa prezo, sed mi rifuzas. Poste, ni atingas la Halon St-Pierre, sed ĝi estas fermita. Sube de la monteto, ni iras al la vendejo Champion Market apud la Strato de Martiroj kaj la Bulvardo de Rochechouart. Ni aĉetas manĝoprovizojn. Ĉi tie, mi trovas interesajn ravajn nugatojn, kiujn mi eble pli malfrue aĉetos por hejmdonaco. Revenante al la hotelo, mi manĝas ravan krepon de banano kun sukero ĉe apuda krepajo. La blankula krepisto ne uzas gantojn por trakti la bananojn dum krepfarado. Ĉe la ĉirkaŭaĵoj estas multegaj Mezoriantaj brunuloj inter Francaj blankuloj.

Ni marŝas laŭ la Strato d' Amsterdam al la Galerioj Lafayette kaj la Opero Garnier.

Lafayette estas multekosta magazeno. Garnier estas impona antikva konstruaĵo.

Mi antaŭplanas la celojn por morgaŭ. Eble, ni iros al la Avenuo de la Elizeaj Kampoj, la Arko de Triumfo, kaj la Turo Ejfelo.

La 4an de Junio, pluvas hodiaŭ. Eble, ni iros al la Muzeo de Luvro anstataŭ la Turo Ejfelo.

Ni iras al la plej proksima metroa eniro de la Placo de Clichy. Ni eliras la stacion Concorde. La metroa sistemo estas facile uzebla kaj rememorigas min pri Tokio. Tra la Ĝardeno de Tuileries, ni marŝadas. Ĝi estas bela loko kun multaj statuoj. Ĉe la Muzeo de Luvro, granda loko, ni marŝadas kaj rigardas interesajn objektojn dum 3,5 horoj de 9.00 atm. al 12.30 ptm. Mi manĝetas ĉi tie longan panon kun kokaĵo (*baguette poulet*). Se mi loĝus en Parizo, mi vizitus la Luvron ĉiusemajne. Ekzistas multaj rigardaĵoj. Poste, ni iras al la vendejo Luvro de la Antikvaĵoj kaj trovas ĉi tie multekostajn altgradajn antikvaĵojn, kio mi ne antaŭsupozis. Poste, ni metroas. Ni eniras la stacion Palaco Reĝa / Muzeo de Luvro por iri al la Placo de Clichy, nia hejma metroa stacio.

Por ŝpari monon, mi aĉetas ĉe Araba butikon glaciteon aŭ mentoteon je la 1,5-litra plasta botelo po 1,90 eŭroj, anstataŭ el la hotela vendmaŝino je 33-centilitra botelo po 2,00 eŭroj.

Tagmeze, la pluvo haltas.

Mi rimarkas, ke ja ekzistas multaj malsamaj popoloj en Parizo: blankuloj, Araboj, nigruloj, kaj eĉ flavuloj.

La 5an de Junio, la ĉielo bluas. El la metroo, ni eliras la stacion Porte-de-Clignancourt. Ni atingas la Bazaron de Puloj de St-Ouen kaj Clignancourt. Mi aĉetas etan kristalan piramidon kun la Turo Ejfelo gravurita en ĝia centro. Poste, mi devas uzi la elektronikan necesejon sur la strato. Ĝi aspektas kiel arĝenta cilindreskaĵo kun aŭtomata puriga kaj lava sistemo en ĝi. La prezo por uzo estas 0,40 eŭro. Poste, ni eniras la metroan stacion Porte-de-Clignancourt.

Ni eliras la metroan stacion Invalides kaj marŝas okcidenten laŭ la Kajo d'Orsay kaj laŭ la Rivero Sejno. Ni atingas la Turon Ejfelo kaj ĉirkaŭmarŝadas ĝin. Brito alproksimiĝas al Eva kaj demandas ŝin ĉu ŝi havas cigaredan fajrilon. Ŝi neas. Ni marŝas plu kaj rigardas butikaron de antikvaĵoj kaj iras al ĝi. Ĉi tie, mi manĝetas krepon de ŝinko kaj ovaĵo kaj mi trinkas glaciteon. Ni iras al la Muzeo Rodin. La statuoj kaj aliaj artoj imponas min. La muzeo estas antikva konstruaĵo kun ĝardenoj, kie troviĝas kelkaj statuoj fare de Rodin.

Ni atingas la metroan stacion Varenne. Ĉi tie, mi aŭdas Francan familion, gepatrojn kaj geknabojn, parolantajn pri «iu Japano... trista... verkita»; evidente, temas pri Budaismo. Poste, la sekureculoj de la stacio petas ĉiujn eliri la stacion pro la vizito de la Usona Prezidento Bush ĉirkaŭ ĉi tie. Ni devas marŝi plu pasante preter du fermitaj metroaj stacioj ĝis tria stacio, kiu estas malfermita, la stacio Franklin-D.-Roosevelt. De ĉi tie, ni atingas hejmen la stacion Placo de Clichy. Sinjoro Bush ŝuldas de mi unu eŭron por

malŝparita metroa bileto.

Ĉe la hotelo, mi uzas la Interreton po 7 eŭroj por horo pro komuniki kun miaj amikoj ĉe la Filipina Uzreta forumo. Ekster la hotelo, mi ĉirkaŭmarŝas kaj malkovras bonajn Ĉinajn restoraciojn en la loko ĉe la Avenuo de Clichy kaj Strato de Clichy. Mi intencas provi ilin pli malfrue. Mi malkovras ankaŭ aliajn pli grandajn butikojn por manĝoprovizoj.

La 6an de Junio, ree la ĉielo bluas. Ni eliras la stacion Rambuteau kaj marŝas laŭ la Strato Quincampoix. Ni atingas la Muzeon Picasso. Hodiaŭ, la enirado estas senpaga. Kiam ni eniras, estas multaj junaj Koreaj studentoj ekstere. La muzeo mem ne havas multajn artobjektojn, sed tiuj, kiuj ekzistas ĉi tie, estas belaj. Ĉe la turisma librovendejo, mi aĉetas la Franclingvajn librojn *Promenadoj en la Parizo Malaperita* de Leonard Pitt kaj *Picasso la Saĝulo kaj la Folulo* de Marie-Laure Bernadac kaj Paule du Bouchet.

Ni pasas preter la Centro Georges-Pompidou, modernarta muzeo, kaj ne eniras ĝin ĉar la starvico estas tro longa. Ni marŝas apud la Kirko St-Merri. Ni marŝas laŭ la norda flanko de la Insulo de la Urbo kaj atingas la eksteron de la Kirko de Nia Damo. Estas ĝardeno kaj fontanoj. Freneza turistoj banas sin en la akvo de fontano. Ni eniras dum meso. Estas mallume en ĝi. Ni pasigas kelkajn minutojn ene. Ekstere estas subgrunda necesejo, kiu humure postulas po 0,41 eŭro por uzo. Ni eliras kaj marŝas maldekstrume ĉirkaŭ la Insulo St-Louis. Apud la Rivero Sejno ĉe la Kajo de la Tournelle kaj Kajo Montebello estas vendejetoj de uzitaj libroj kaj afiŝoj. Mi aĉetas la sciencfikciaĵon *Marsaj Kronikoj* verkitan de Ray Bradbury, la Francan tradukon. Ekzistas ankaŭ tre antikvaj libroj el la 19a jarcento ĉi tie.

Ni eniras la stacion Maubert-Mutualité. Ni havas Ĉinan bufedon ĉe la Avenuo de Clichy po 8,50 eŭroj. Finfine, mi manĝas veran manĝaĵon post kelkaj tagoj de pano, pano, kaj pano; kaj krepo, krepo, kaj krepo.

Ĉe la hotelo per la Vindoza komputilo kun strangan Francan klavaro, mi kontrolas retpaĝojn kaj malkovras, ke Orientaziaj signoj aperas kiel nelegeblaj blokoj ĉar la tiparoj ne instaligis, sed Esperantaj supersignitaj literoj aperas bone legeblaj.

La 7an de Junio, varmas kaj la ĉielo bluas. Mi iomete rigardas la televidon ĉe la hotela ĉambro. Okazos elektado de la Eŭropunia Parlamento la 13an de Junio. Estas nigrulino, kiu kandidatas por Francujo; ŝi nomiĝas Christiane Taubira de la Radikala Maldekstra Partio.

Ni metroas kaj eliras la stacion Elizeaj Kampoj Clemenceau. Ni marŝas laŭ la Avenuo de la Elizeaj Kampoj. Ni eniras la muzikvendejon Virgin MegaStore. Sur la dua etaĝo, mi fotas la halon, sed nigra sekureculo avertas min, ke mi ne fotu ĉi tie. Mi diras al li Franclingve, «Je suis désolé» (Mi bedaŭras). Mi serĉas tra la kompaktdiskoj vendataj kaj mi trovas KD-on de la Franca muzikisto Pascal Obispo. Sed ĝi estas tro multekosta, po pli ol 20 eŭroj. Unu eŭro kostas po ĉirkaŭ 1,60 Kanadaj dolaroj hodiaŭ. Mi traserĉas la librojn, inkluzive de sciencfikciaĵoj, ĉe la subgrunda etaĝo kaj mi trovas en la spirita sekcio la Francan tradukan libron *La Tao de Pooh* de Benjamin Hoff; mi interesiĝas, sed mi

ne aĉetas.

Post ol mi ŝangas 150 eŭrojn de vojaĝĉekoj al kontanto, ni butikumas por memoraĵoj. Mi aĉetas plastkristalan piramidon, la duan, kun la Turo Eĵfelo engravurita. Mi malkovras pli malfrue, ke ĝi kreiĝis en Ĉinujo. Ankaŭ etan metalan Turon Eĵfelo mi aĉetas. Poste, ni marŝas plu kaj iras al la Arko de Triumfo. Mi supreniras per la spirala ŝtuparo al la alta teraso. Ĉi tie, mi rigardas sube la verdajn arbojn laŭ la Avenuo de la Elizeaj Kampoj kaj mi fotas.

Ni metroas kaj eniras la stacion Charles de Gaulle Étoile kaj eliras la stacion Anvers. Ni serĉas lokon, kiu nomiĝas Art's Factory, sur 48 Strato d'Orsel, sed ni ne trovas. La Halo St-Pierre estas ree fermita.

Ĉe manĝvendejeto, mi lernas, ke la eŭrocendo nomiĝas «centime» en la Franca. Estas strange, ke mi devas doni 10,06 eŭrojn por aĉeto de 7,46 eŭroj kun 2,60 eŭroj redonataj al mi. La Franca komizino petas min fari tion. En Kanado, oni ne ofte faras malsimplaĵon pri mono en vendejetoj, speciale kiam estas longa starvico malantaŭe de oni. Mi konfuziĝas.

La 8an de Junio, la vetero estas varma kaj T-ĉemizeca. Ni metroas kaj eliras la stacion Tuileries. Ni iras al la Ĝardeno de la Tuileries kaj sidas ĉi tie sub la ombro. Estas kviete. Estas multaj ekzercantoj kaj trotantoj ĉirkaŭe. Mi aŭdas Japane, «Chūgokujin kanā? Nihonjin kanā?» (Ĉu Ĉino? Ĉu Japano?). Ni atendas la malfermadon de la apuda Muzeo d'Orsay.

Ni vizitas la muzeon kaj rigardas la artobjektojn kaj verkojn. Poste, ni marŝas laŭ la Bulvardo St-Germain. Ni vidas la faman Kafejon de Flore. Ni pasigas la Kirkon St-Germain-des-Prés. Ni eniras la stacion St-Germain-des-Prés.

En la trajnon, kelkaj blankaj dekkelkjaruloj marŝas, estante spiritismaj; unu el ili tenas en sia mano bastoneton de brulanta incenso.

Ni iras al Ĉina-Taja restoracio sur la Avenuo de Clichy. Ni interiras la starvicon kaj mendas la ekspresmanĝon. Kiam ni preskaŭ finas manĝi, mi aŭdas malantaŭ ni oldan Francinon sakri; ŝi diras Franclingve, «Espèce de salaud!» (Speco de fripono!) ĉar eble ŝi aŭdas nin parolantajn Angle. Kiu vere scias? Eble kontraŭ-Usonaj sentimentoj altiĝas en Francujo pro politiko.

Mi vizitas librovendejon ĉe la Placo de Clichy apud la hotelo. Ĉi tie, mi demandas ĉu ekzistas ajnaj libroj en Esperanto. Estas nenio. Ŝajnas, ke la temo estas tiel nekaptebla ĉi tie kiel en Kanado. Esperantolando esence ekzistas en la Interreto. Mi marŝas revenante al la hotelo kaj Germanino diras «Schön!» (Bela!). Mi bruniĝas sub la suno.

Jam vizitinte kelkajn artmuzeojn, mi malkovras, ke mi mem preferas Azian arton ol Okcidentan. Estas nova revelacio por mi. Sed mi estas ja adoranto de Picasso kaj Monet. En Azia arto estas ja balanco kaj trankvilo, kiu mankas al Okcidenta arto. Sed mi lante

plivalorigas Okcidentan arton.

La Parizanoj ŝajnas al mi iom apartaj, eĉ ne amikecaj, sed ili estas ĝentilaj dirante Franclingve «Pardon!» (Pardonu!) multe en multaj situacioj. Mi pli komprenas la Francan karakteron.

La 9an de Junio, varmas kaj la ĉielo bluas. Ĉe la hotela televido, mi rigardas Francajn muzikvideojn. Ili estas freŝaj. Mi al kutimiĝas al la rigardado de ĉi tiuj muzikvideoj ĉi matene.

Glaciteo nomiĝas «ice tea» en Francujo, ne «thé glacé» kiel en la Kanada Franca. Oni mendas je «Lipton Ice Tea» kaj ne «Lipton Thé glacé».

Ni manĝas ĉe Makdonaldo ĉi-matene ĉar ni laciĝas pri krescentpanoj kaj aliaj panoj, la «kontinentaj matenmanĝoj» dum la 2a al la 8a de Junio.

Ni metroas kaj eliras la stacion Esplanade de la Défense. La metroo estas homplena en la formikeca aŭ sardineca mateno.

Ni vizitas la modernan distrikton de la urbo, La Défense. La loko estas spacoeraa kontrasto al la antikvaĵoj de la ceteraj de la urbo. Se ĉi tiu estus Manilo, ni troviĝus en la distrikto de Makati. Mi komparas.

Ĉe La Défense, ni vidas la Grandan Arkon, gigantan kuban konstruaĵon, kiu estas kava en la centro. Mi havas bonan senton pri ĝi. Ĝi imponas min pli ol la Turo Eĵfelo.

Benkoj estas raraj en ĉi tiu loko. La seĝoj apud la kafejoj estas kunpagaj. Se oni volus sidi, oni devus pagi. Tia situacio ekzistas en la halo CNIT.

Parizo ne montras tiom da teknologiaĵoj kiom en Tokio. Ĉi tie, oni ankoraŭ aĉetas metroajn biletojn el realaj homoj, ne el maŝinoj kiel en Tokio. En Tokio, ekzistas larĝaj altgradteknologiaj ekranegoj sur konstruaĵoj eĉ antaŭ pli ol dek jaroj. La Pariza teknologio estas plejparte kaŝata. Sed la modernaj metalaj necesejoj sur la stratoj estas fakte evidento de altgrada teknologio.

Ni metroas kaj eniras la stacion La Défense. Ĉe la Strato de Douai, apud nia hotelo, estas Ĉina restoracio, kie ni manĝas. Mi trovas bonan Interretbutikon sur la Strato Biot apud la hotelo. Ĉi tie, oni pagas nur po 2,50 eŭroj por horo. Ĉe la hotelo, Interretuzo kostas po 7 eŭroj. Ĉe la butikoj en Biot, la maŝinoj montras Orientaziajn signojn kaj Esperantajn literojn bone legeblaj, kvankam la titoloj sur la retpaĝoj montras fojfoje demandosignojn. La komizino kaj komizo estas Hindoj.

Mi vere uzas la Francan lingvon ĉi tie. La lingvo sentiĝas de mi pli reala dum mi estas nun en Parizo.

Mi malkovras, ke la Parizanoj estas ja ĝentilaj dirante la vortojn «Merci!» (Dankon!) kaj «Bonjour!» (Bonan tagon!) inter ili.

Multaj publikaj necesejoj estas kunpagaj (po 0,40 eŭro), sed kelkaj estas senpagaj.

Mi iras al Champion Market pro aĉeti nugatojn. Dum mi revenas al la hotelo, sur la Bulvarde de Clichy, du blankaj mezaĝulinoj alproksimiĝante preterpasas kaj unu el ili vidas mian flavan T-ĉemizon, dirante Franclingve «Combien ça?» (Kiom kostas tiu?). Mi ne scias ĉu ŝi aludas al mia kaŝata, sed subtile videbla, monsako sub la T-ĉemizo.

La 10an de Junio, varmas kaj la ĉielo bluas. Mi ŝatas manĝi ĉe MakDonaldo ree ĉi-matene ĉar krepo kostas po 2,00 al 2,50 eŭroj, sed MakDonalda Ovaĵa MakMafino kostas nur po 1,70 eŭroj kaj estas pli pleniganta. La komizino estas la sama juna nigrulino kiel hieraŭ.

«Deux Egg McMuffins.» (Du Ovaĵaj MakMafinoj.)

«Un Jus d'Orange. Moyen.» (Unu orangŝuko. Meza.)

«Sur place?» (Ĉu ĉi-loke?)

«Oui, je mange ici.» (Jes, mi manĝas ĉi tie.)

Ni metroas kaj eniras la stacion Cluny-La Sorbonne. Ni vizitas la Latinan Kvartalon, lokon de intelektuloj. Ni marŝas laŭ la Bulvarde St-Michel. Estas multaj librovendejoj. Ni eniras librovendejojn.

«Avez-vous des livres sur l'Espéranto?»

(Ĉu vi havas librojn pri Esperanto?)

«Est-ce qu'il y a un livre sur l'Espéranto?»

(Ĉu ekzistas libro pri Esperanto?)

«Non. Malheureusement.» (Ne. Malfeliĉe.)

Sed pli malfrue, mi demandas aliloke kaj trovas Franclingvan libron pri Esperanto, sed ĝi estas tro baza. Ĝi apartenas al la serio «Que sais-je» (Kion scias mi). Ĝi estas verkita de Pierre Janton kaj estas la sola libro pri Esperanto, kiun mi trovas ĉi tie. Mi ne aĉetas ĝin.

Ni vizitas la Ĝardenon de Luksemburgo. Ni sidas sur benkoj sub la ombroj de multaj belaj arboj. Estas tre bela parko. Poste, ni eniras la metroan stacion Luksemburgo.

Ree ni manĝas ĉe la Ĉina restoracio sur la Strato de Douai apud la hotelo. Mi iras al vendejoj. La prezoj de 1,5-litra «Lipton Ice Tea» (Liptona Glaciteo) aŭ «Volvic Thé vert Menthe» (Volvika Verda Mentoteo) varias multe en la sama areo. Ĉe la Strato Biot, Volvika Verda Mentoteo kostas po 1,69 eŭroj. Sur la botelo estas skribita «el la ekstraktoj naturaj de mento de Maroko». Poste, mi aĉetas du metalajn platojn kun antikvaj reklamoj kiel memoraĵojn.

Pluvas dum kelkaj minutoj ĉirkaŭ 5.00 ptm. Poste, sunbrilas ree. Ĉe librovendejo sur 7-9-11 Placo de Clichy 75017 Parizo, mi aĉetas Franclingvan libron *Vagabondaĵoj Literaturaj en Parizo* de Jean-Paul Caracalla.

La 11an de Junio, estas iomete nube kaj malvarmete. Ne estas MakMafinoj por la

matenmanĝo, sed estas BigMako kaj oranĝsuko. Ni metroas kaj eliras la stacion Ménilmontant. Ni marŝas tra la kurioza najbarejo de Ménilmontant. Franco avertas min pri mia fotilo kaj ŝtelistoj. Ni atingas la Parkon de Belleville, altan kvietan lokon. Poste, ni trairas la multetnan kvartalon de Belleville kun ĝiaj okupataj vendejoj. Ĉi tie multaj Araboj, Afrikanoj, kaj Judoj troviĝas kun siaj vendejoj flankon al flanko.

Mi vidas multajn ge-Afrikanojn vestatajn per tradiciaj buntaj kostumoj. La Afrikaninoj havas brilkolorajn turbanojn. Mi sentas, ke estas maloportune por foti ilin.

Poste, ni atingas la grandan Parkon de Buttes-Chaumont, kiu estas alta kaj antikva. Estas multaj geknaboj ĉi tie. Ni metroas kaj eniras la stacion Laumière. Ni manĝas en Barata restoracio por tagmanĝo ĉe la Strato Biot. Mi manĝas Karezan Fiŝon.

La 12an de Junio, malvarmetas kaj la ĉielo bluas. Por matenmanĝo estas du MakMafinoj. Ĉi-foje la komizino estas juna blankulino kun nigra hararo, eble Arabino. Ni metroas. En la trajno, estas stranga incidento, en kiu Japana turistino faras strangan bruon apud iu nigrulego. Mi ne tute komprenas ĉu la jaketo de Japano estas ŝtelita aŭ kio. Ni eliras la stacion Porte de Vanves.

Ni atingas la Bazaron de la Porte de Vanves, kie vendiĝas multaj objektoj, inkluzive de antikvaĵoj. Mi aĉetas du antikvajn librojn *Verkoj de Béranger* de la jaro 1853 po 10 eŭroj kaj *Baedeker Parizo kaj Ĝiaj Ĉirkaŭaĵoj* de la jaro 1911 po 20 eŭroj. Ni metroas kaj eniras la stacion Porte de Vanves. Ni tagmanĝas en la Japana restoracio Naoko ĉe la Strato Biot. Eva akiras stomakan malsanon ĉar ŝi estas nature sentiva al strangaj manĝaĵoj.

Mi rimarkas, ke ge-Parizanoj estas plejparte sveltaj pro ekzerco de marŝado eble.

Post niaj marŝadoj, plejparte da tagoj, mi vizitas la Librovendejon de Parizo ĉe la Placo de Clichy kaj traserĉas la imponan varion da Franclingvaj libroj, inkluzive de filozofiaj, artaj, sciencfikciaj, kaj klasikaj.

Ŝajnas, ke la esprimo «Espèce de salaud!» (Speco de fripono!) estas kutima kaj ĉiea.

Mi manĝas bananan krepon kaj mi pensas, ke la Barata krepisto preterprezpostulas min po 3,00 eŭroj por unu krepo, sed mi eraras pri tio. Li pensas, ke mi estas Japano kaj diras «Hai!» (Jes!).

Mi trovas alian Interretbutikon ĉe la Avenuo de Clichy. La uzado kostas po 2,50 eŭroj por horo. La komizoj ŝajnas Araboj. Unu el ili humure diras al mi, ke eble mia amikino (Franclingve «ta copine») estas oldulo, kio probable signifas la Interreton aŭ alian.

La 13an de Junio, estas nube kaj malvarmete. Mi manĝas du MakMafinojn por matenmanĝo. Ni metroas kaj eliras la stacion Respubliko. Ni marŝas norden laŭ la Kanalo St-Martin. Mi vidas interesan politikan afiŝon, sur kiu skribiĝas «La estonteco de Eŭropo estas Eŭrazio». La kanalo estas tre longa. Ni atingas la Kanelon de l'Ourcq kaj la Parkon

de la Villette. La parko aspektas postmoderna. Ni vidas la belegan konstruaĵon La Géode, kiu estas arĝenta polura globo. Ni aŭdas sonorilon, kiu faras metalajn klin-klon-sonojn. Estas alia postmoderna konstruaĵo, parto de la Urbo de Sciencoj kaj Industrio. Ni metroas kaj eniras la stacion Porte de Pantin.

Ni tagmanĝas ĉe Ĉina restoracio sur la Strato de Douai. Mi vizitas la Interretbutikon ĉe la Avenuo de Clichy. Mi rimarkas, ke la Orientaziaj signoj aperas kiel nelegeblaj blokoj, sed Esperantaj literoj aperas bone legeblaj.

Por vespermanĝo, mi havas bananan krepon.

La 14an de Junio, malvarmetas kaj la ĉielo bluas. Estas unu MakMafino por matenmanĝo. Ni marŝas laŭ la Strato Lepic al la alta najbarejo Montmartre ree. Ni vizitas la Placon de Tertre kaj la Bazilikon de la Sankta Koro. Mi aĉetas la trian plastkristalan piramidon kun la Turo Eĵfelo engravurita. Ĉi-foje ĝi inkluzivas de engravurita koro. Mi aĉetas tri metalajn platojn kun antikvaj reklamoj supozatajn esti po 16 eŭroj por la tuto, sed la komizino donas ilin al mi por la tuto po 8 aŭ 6 eŭroj. Ni atingas la antikvan najbarejon de la Abatinoj. Ni tagmanĝas ĉe Ĉina restoracio sur la Strato de la Abatinoj.

Mi atingas la Librovendejon de Parizo ĉe la Placo de Clichy kaj aĉetas la Franclingvan libron *Monet* de Christophe Heinrich po 6,99 eŭroj.

La pasintajn 3an kaj 7an, kaj hodiaŭan 14an de Junio, ni estas sur la Montmartre.

Mi pensas, ke plejparte Parizanoj estas bonaj homoj, kiuj estas helpdonemaj kiam oni demandas. (Mi iomete parolas la Francan.)

Ni verspermanĝas Grekajn Sandviĉojn el la Turka restoracio sur la Avenuo de Clichy. Ni kunportas ilin al la hotelo. La matriarka komizino-posedanto diras al ni, ke estas la sama prezo (Franclingve «C'est la même») por manĝi en la restoracio, sed ni decidis manĝi ekstere.

Ĉe la hotelo, mi rigardas Eŭropuniajn politikojn pri elektoj en la Franclingva televido.

La 15an de Junio, varmas kaj la ĉielo bluas. Mi matenmanĝas ŝinkan krepon. De la Placo de Clichy, ni marŝas al la Bulvardo de Courcelles. Sur la vojo, mi vidas politikan reklamafiŝon pri Esperanto. Sur ĝi skribiĝas Franclingve «Eŭropo - Demokratio - Esperanto - Dua lingvo por ĉiuj». Ni atingas la Parkon Monceau, kvietan lokon, ĉirkaŭ kies eniro mi vidas aron da homoj, kiuj aspektas Filipinanoj. En la parko estas skulptartoj kaj ruinoj. Apud la parko estas la Strato Murillo, kie estas altgradaj multekostaj antikvaj bienaj apartamentoj.

Revenante al la hotelo, ni tagmanĝas ĉe Ĉina restoracio sur la Bulvardo de Batignolles. Ekzistas Ĉina restoracio en preskaŭ ĉiu najbarejo.

La 16an de Junio, estas nube kaj malvarmete. Por matenmanĝo estas du MakMafinoj. Ni metroas kaj eliras la stacion Rambuteau. Ni atingas la Centron Georges-Pompidou,

modernartan muzeon. En ĝi estas multaj strangaj artverkoj, kelkajn el kiuj mi ŝatas. Sed mi mem povus verki pli bone ol kelkaj artistoj, kiuj ne multe imponas min. Ni eliras la muzeon kaj marŝas laŭ la Strato Rambuteau kaj la Strato de Francs-Bourgeois. Ni iras al la Placo de la Vosges, kie estas parko kun multaj homoj sidantaj sur la gazono. Ni sidas sur benko dum kelkaj minutoj. Poste, ni metroas kaj eniras la stacion Bastille.

En la trajno, juna nigrulo sidas kun sia amiko, juna blonda blankulo. Ili parolas Ĝermanan lingvon, eble la Svedan aŭ la Nederlandan. La nigrulo demandas min Franclingve pri direktoj. Mi sentas min pli Eŭropeca. Mi konsciiĝas, ke «esti Eŭropano» ne vere signifas, ke oni estas blankulo. Kelkaj aliaj neblankuloj antaŭe demandis min pri direktoj en la urbo ĉar eble mi aspektas Parizano, kvankam mi kunportas malnovan grandan grizan sakon, kiu harmonias kun la antikvaj konstruaĵoj. Eble mi aspektas studento.

Sur la Strato Biot, ni tagmanĝas ĉe kurioza Taja-Ĉina restoracio. Ni renkontas vigran junan Ĉinan kelneron, kiu diras al ni, ke li ne lernis la Ĉinan kaj parolas nur la Francan kaj iomete la Anglan. Li naskiĝis en Francujo.

Poste, Franca junulino, kiu estas komizino ĉe vendejo, donas al mi grandan rabaton por du 1,5-litraj boteloj de Volvika Verda Mentoteo.

Ni vespermanĝas ene (Franclingve «sur place») ĉe la Turka restoracio sur la Avenuo de Clichy.

La 17an de Junio, malvarmetas kaj la ĉielo bluas. Estas longa atendo por du MakMafinoj antaŭ la matenmanĝo. Ni metroas kaj eliras la stacion Bercy. Ni longtempe marŝas laŭ la Rivero Sejno. Estas moderna areo de la urbo. Ni vizitas la modernan Parkon de Bercy. Kiam ni sidas sur benko, juna Franco demandas min pri la tempo, dirantan, ke estas 11.10 atm. Poste, ni vidas la eksteron de la Nacia Biblioteko, formita kiel kvar gigantaj malfermitaj starantaj libroj. Ni trapasas la Ĝardenon de Plantoj. Ni eniras la Moskeon de Parizo. Mi trinkas varman mentoteon en ĝia Arabeska salono. Interese, Eva trinkas ordinaran eferveskaĵon Koka-Kolo. Ni metroas kaj eniras la stacion Gare d'Austerlitz. La trajno estas homplena ĉirkaŭ 2.00 ptm. Aro da ebriaj Britaj olduloj faras ŝajne feliĉan bruon en la trajno.

Ni tagmanĝas ĉe la Ĉina restoracio sur la Strato de Douai. Glaciteo kaj rizo aŭ nudeloj kun selektita entreo de kokaĵo, bovaĵo, fiŝaĵo, kaj alia kostas po ĉirkaŭ 10,00 eŭroj por la tuto. Por Kanadanoj, ĝi estas multekosta.

Mi vespermanĝas frititan kokaĵon ĉe Euro Fried Chicken sur la Avenuo de Clichy.

La 18an de Junio, malvarmetas kaj la ĉielo bluas. Ni ne matenmanĝas. Ni marŝas laŭ la Strato de Clichy al la Kovritaj Trairejoj (Franclingve «Passages Couverts»), kie mi aĉetas antikvan poŝtkarton de la jaro 1910.

Ni manĝas ĉe Ĉina restoracio sur la Strato de Faubourg-Montmartre. La Franclingva akcento de la Ĉina komizino estas tiel malfacile por kompreni. Ŝi ne parolas la Anglan, eĉ

Kiam mi petas ŝin. Eble ŝi ne scipovas la Anglan lingvon.

La tagmezon, nubigas kaj restas malvarmete.

Ni vespermanĝas ĉe Ĉina restoracio sur la Avenuo de Clichy. La komizino donas al mi grandan pladon de karea rizo kaj satea kokaĵo. Ŝi ne ĝenas sin pesi la pladon, kiu kostas po nur 6,00 eŭroj.

Mi vizitas la librovendejon sur la Placo de Clichy. Komizo ludas kaŝu-kaj-trovu-on kun mi. Rigardante apud la librobretoj kie mi antaŭe staris, li diras al alia komizo, ke mi malaperis al nenio (Franclingve «néanti»).

La 19an de Junio, pluvigas kaj malvarmetas. Pro la pluvo, ni nuligas nian planon reiri al la Bazaro de la Porte de Vanves. Por matenmanĝo estas ŝinka krepo. Ni marŝas al la najbarejo Nova Ateno. Ni iras al la Placo José Rizal, kie estas plene da Filipinoj, kiuj festas pri la naskiĝdatreveno de José Rizal, nacia Filipina heroo. La Filipina Konsulo estas ĉi tie. Kiam ni alproksimiĝas al la hompleno, ili kantadas la Filipinan Nacian Himnon kaj la Francan Nacian Himnon. Estas amuze, ke la cetero de la diskutoj estas per la Angla lingvo. Ni estas en Francujo kaj ili estas Filipinoj. Kial ne estas per la Franca, aŭ per la Filipina? Estas strange.

La tagmezon, estas nube, sed sune. Ni tagmanĝas Grekajn Sandviĉojn ĉe la Turka restoracio sur la Avenuo de Clichy.

Ĉe la apuda librovendejo sur la Placo de Clichy, mi aĉetas la dikajn librojn *Parizo 500 Fotoj* de Maurice Subervie po 30,00 eŭroj.

La 20an de Junio, estas nube kaj malvarmete. Ni sidas en krepejo sur la Bulvardo de Clichy kaj mi matenmanĝas ŝinkan krepon. Ni revizitas la Tombejon de Montmartre kaj la homplenan Placon de Tertre. Estas nia kvara fojo sur la alteta Montmartre.

Ni tagmanĝas en Japana restoracio Takasaki sur la Bulvardo de Clichy.

Ni vespermanĝas en Ĉina restoracio sur la Strato de Douai.

La 21an de Junio, estas nia lasta tago en Parizo. Mi lasas skatolon da Turkaj ĵeleoj por la ĉambristino. Ni prenas nian antaŭaranĝitan taksion al la flughaveno. Ni flugas al Kanado.

Mia aeroflugo kostas po 1314,50 Kanadaj dolaroj. La hotelo kostas po 2792,00 Kanadaj dolaroj por du personoj. Miaj memoraĵoj kaj manĝoj kostas po meznombre 34,66 eŭroj por tago; estas entute 658,57 eŭroj aŭ ĉirkaŭ 1053,71 Kanadaj dolaroj. Unu eŭro kostas po 1,60 Kanadaj dolaroj. La tuta elspezo estas do ĉirkaŭ 3764,21 Kanadaj dolaroj, ekskluzive de la antaŭaĉetitaj cifereca fotilo kaj nova pakaĵujo.